

pensi pri la sekvonta kaj kontakti urbestrojn, lernejestrojn kaj hotelestrojn en diversaj urboj, sciigi la rezultojn al la konsilio de GEE, propagandi la studperiodojn, sendi informojn al la interesatoj, ktp...

1939 — Dua mondmilito — La tiujaraj Someraj Lernejoj fiaskis. La esperantistaj aktivaĵoj en multaj landoj ĉesis aŭ estis ĉesigitaj. En Francio mem esperantistoj estis arestitaj, deportitaj. Multaj mortis aŭ estis mortigitaj. Sed ek de la Liberigo de la lando en 1945, GEE reviviĝis kaj tuj, komisiite de la estraro, Micard organizis la unuan postmilitan

mont ; 1948 : La Rochelle ; 1949 : Angoulême kaj Granville ; 1950 : St-Germain (apud Parizo). Sed en la printempo 1951, Micard trovis nenion urbon por akcepti la venontan Someran Lernejon. La malfacilaĵo estis trovi ĉiujare novan lokon. Kial ne havi definitivan lokon? Precize, en Sablé, estas vendota granda domo. Tiu estas la solvo. Sed kiel ĝin aĉeti? Micard tuj sin turnis al geamikoj kaj la multobligilo funkciis. En la unua cirkulero aprobita de la GEE estroj tiamaj : Fino J. Dedieu, Sroj Debande, Thébaut, Bidoit kaj Boyet, sendita al 100 esperantistoj Micard skribis : « La organizado de somerlernejo estas pli kaj pli malfacila ĉar ni ne



Micard en Grésillon

Someran Lernejon en Sablé-sur-Sarthe. Sed pli kaj pli malfacila estis la organizado de tiaj renkontoj pro diversaj kialoj : la marbordoj estis parte malpermesitaj pro danĝero prezentita de bomboj ankoraŭ kuŝantaj en la sablo, en la arbaroj aŭ en la blokhaŭsoj ; plie multaj el la marbordaj vilaĝoj aŭ urbetoj estis parte detruitaj ; la lernejoj en la kamparo kaj montaro estis ofte utiligataj dum la somero por akcepti infanojn el la urboj ; la prezoj en la hoteloj estis tro altaj por la salajro de la instruistoj. En 1946 okazis la Somera Lernejo en Sassenage en la Alpoj ; 1947 : denove Sablé-sur-Sarthe kaj Bel-

disponas pri domo *posedata de ni...* Tiu hodiaŭa sonĝo povas fariĝi morgaŭa realo. Por tio sufiĉas ke kune ni volu... Nuntempe estas vendota en Sablé bieno, kun domo kiu povas loĝigi proksimume 50 personojn... Ni povus trovi lokon pli favoran ol Sablé. Sed estas necese, ke proksime loĝu esperantisto konsentanta labori por krei tion, kion ni deziras. Mi esperas esti pensiulo post unu jaro. Eble mi povos vivi la necesajn jarojn por starigi kaj firmigi tiun aferon... Sufiĉus ke 600 esperantistoj pruntedonu po dek mil frankojn (tiamaj) por ke ni disponu pri la ses milionoj necesaj. (Sekvis plano de